ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




Numero 7-9/2018

Julio-Septembro 2018

**_Sur la kovrilo:_** La papo Francisko en Monda Renkontiĝo de Familioj, Irlando

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| DIVIDU LA EVANGELION DE LA FAMILIO KIEL ĜOJON DESTINITAN AL LA MONDO! | 35 |
| JESU´, DUM VIVO | 37 |
| LA 22-A EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO | 38 |
| PRIŜTELITA USONA TURISTO SKRIBIS AL ŜTELISTO: MI PARDONAS AL VI! | 41 |
| FESTO DE LA SANKTAJ ĈEFANĜELOJ MIĤAEL, GABRIEL KAJ RAFAEL | 42 |
| PREĜO AL LA ĈEFANĜELO MIĤAELO | 42 |
| GEEDZECO DE DIVORCULOJ | 44 |
| VOJKRUCIĜOJ DE LA VIVO | 45 |
| SUB VIAN PROTEKTON | 46 |
| ESTU PERANTINO | 46 |
| PRINTEMPO | 46 |
| LA PREDIKO PRI LA SANKTA MES-OFERO | 47 |
| MI ESTAS LA VOJO KAJ LA VERO KAJ LA VIVO | 48 |



**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org *** Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano:** Pavol Petrík. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# DIVIDU LA EVANGELION DE LA FAMILIO KIEL ĜOJON DESTINITAN AL LA MONDO!

## Homilio de la papo dum la sankta meso en la Monda Renkontiĝo de la Familioj la 26-an de aŭgusto 2018 en Dublino, Irlando

**»Vi havas la vortojn de eterna vivo« (Joh 6,68).**




Fine de la Monda Renkontiĝo de la Familioj ni renkontiĝas kiel familio ĉirkaŭ la tablo de la Sinjoro. Ni dankas al la Sinjoro pro multaj benoj, kiujn ricevas niaj familioj. Ni volas nian alvokiĝon vivi en pleneco, por ke ni laŭ vortoj de la sankta Tereza de Infano Jesuo estu „amo en la koro de la eklezio“.

En ĉi tiu grava momento de la komuneco inter ni kaj kun la Sinjoro estas bone halti kaj mediti pri la fonto de ĉiu bono, kiun ni ricevis. Jesuo revelacias devenon de tiuj ĉi benoj en la hodiaŭa evangelio, kiam Li alparolas siajn disĉiplojn. Multaj el ili estis konsternitaj, konfuzitaj kaj ankaŭ indignitaj; ili diskutis pri tio, ĉu akcepti lian „malfacilan parolon“, kiuj ege kontraŭstaras al saĝeco de tiu ĉi mondo. La Sinjoro respondas al ili rekte: »La vortoj, kiujn mi diris al vi, estas spirito kaj estas vivo« (Joh 6,63).

Tiuj ĉi vortoj promesas la donacon de la Sankta Spirito, ili alportas al ni, kiuj ilin per kredo akceptas, abundecon de la vivo. Ili indikas lastan fonton de ĉiu bono, kiujn ni spertis kaj festis en tiuj ĉi tagoj: la Dian Spiriton, kiu senĉese enspiras novan vivon al la mondo, al la koroj, al la familioj, hejmoj kaj paroĥoj. Ĉiu nova tago en la vivo de niaj familioj kaj ĉiu nova generacio portas por si promeson de la nova Pentekosto, la hejma Pentekosto, la novan surverŝon de la Spirito, Parakleton, kiun al ni Jesuo sendas kiel nian Advokaton, nian Konsolanton kaj Tiun, kiu al ni vere donadas kuraĝon.

Kiom la mondo do bezonas tiun ĉi kuraĝigon, kiu estas donaco eĉ promeso de Dio! Ĝi estu unu el fruktoj de tiu ĉi soleno de la familia vivo, por ke vi revenonte en viajn hejmojn fariĝu fonto de la kuraĝigo por aliuloj kaj ke vi dividu kun ili »vortojn de la eterna vivo« de Jesuo. Viaj familioj estas ja privilegiitaj lokoj por plenigado kaj samtempe grava rimedo por disvastigo de tiuj vortoj kiel de „bonaj novaĵoj“ por ĉiuj, precipe por tiuj, kiuj deziras forlasi dezerton kaj „domon de sklaveco“ (komp. Joz 24,17) kaj iri en la promesitan landon de la espero kaj libereco.

En la dua hodiaŭa legaĵo al ni la sankta Paŭlo diras, ke la geedzeco estas partopreno en la daŭra fideleco de Kristo al la fianĉino, la eklezio (komp. Efe 5,32). Tiu ĉi instruo, eĉ se grandioza, sed al iu ĝi povas ŝajni kiel „malfacila parolo“. Vivi en la amo kiel Kristo amis nin (komp. Efe 5,2) signifas mortadi al si kaj regeneradi al ĉiam pli granda kaj pli daŭra amo. Al tiu ĉi amo, kiu ununura povas savi la mondon el sklaveco de la pekoj, egoismo, avareco kaj indiferenteco rilate al la bezonoj de tiuj pli malmulte pridonacitaj. Tio ĉi estas la amo, kiun ni ekkonis en Jesuo Kristo kaj kiu enkorpiĝis en nian mondon

pere de familio. Kaj pere de atestadoj de la kristanaj familioj en ĉiu generacio ĝi havas potencon forigi ĉiun barilon de la divido, pacigi la mondon kun Dio kaj fari el ni, kio ni de ĉiam devas esti: unu homa familio, kiu vivas komune en justeco, sankteco kaj paco.



La tasko atesti tiun ĉi bonan mesaĝon ne estas facila. Tamen la alvokoj, antaŭ kiuj staras la nuntempaj kristanoj, ne estas pli malmulte malfacilaj ol tiuj, kiujn devis fronti la unuaj irlandaj misiistoj. Mi pensas pri la sankta Kolumbano, kiu kun kelkaj siaj kunuloj alportis la lumon de la evangelio al eŭropaj landoj dum malhelaj tempoj de la kultura degenero. Ilia eksterordinara misia sukceso ne baziĝis sur taktikaj metodoj kaj strategiaj planoj, sed sur modesta kaj liberiganta submetiĝo per inspiro de la Sankta Spirito. Ilia ĉiutage atestata fideleco al Kristo kaptis la korojn, arde sopirantajn pri la vorto de graco, kiu kontribuis al la kreo de la eŭropa kulturo. Kaj tiu ĉi atesto restas daŭra fonto de la spirita kaj misia renovigo de la sankta kredanta Dia popolo.

Ĉiam kompreneble ekzistos homoj, kiuj rifuzas bonajn mesaĝojn kaj grumblas kontraŭ la „malfacila parolo“. Kiel la sankta Kolumbano kaj liaj kunuloj, kiuj dum sekvado de Jesuo luktis kontraŭ glacibloko kaj onda maro, ni neniam lasu nin influigi aŭ forlogi per la frosteca indiferenteco aŭ per forta ventego de malamemo.

Tamen, se niaj reciprokaj rilatoj estas honestaj, ni humile rekonas, ke ankaŭ al ni povas ŝajni la instruo de Jesuo malfacila. Ĉiam estas malfacile pardoni al tiuj, kiuj nin vundas! Ĉiam estas la alvoko, se ni devas akcepti migranton kaj fremdulon! Estas dolorige tolerporti elreviĝon, rifuzon aŭ perfidon! Kiel malfacile estas protekti rajtojn de tiuj la plej malfortaj, ankoraŭ nenaskitaj aŭ maljunaj, se al ni ŝajnas, ke ili difektas nian senton de libereco.

Tamen, ĝuste dum tiuj ĉi cirkonstancoj nin demandas Jesuo: »Ĉu ankaŭ vi volas foriri?« Per potenco de la Spirito, kiu nin kuraĝigas kaj kun la Sinjoro, kiu senĉese estas flanke de ni, ni povas respondi: »Ni ekkredis kaj scias, ke Vi estas la Sanktulo de Dio« (Joh 6,69). Kaj kune kun la popolo de Israelo ni povas rediri: »Ni do ankaŭ servos al Eternulo, ĉar Li estas nia Dio« (Joz 24,18).

Per la sakramentoj de la bapto kaj la konfirmacio estas ĉiu kristano sendita por esti misiisto, „disĉiplo - misiisto“ (komp. Evangelii Gaudium, 24). La eklezio kiel tuto estas invitita „eliradi“, por porti la vortojn de la eterna vivo al periferio de la mondo. Tiu ĉi nia hodiaŭa diservo firmigu ĉiun el vi, la gepatrojn kaj pragepatrojn, la infanojn kaj



junularon, la virojn kaj virinojn, la geordenanojn, kontemplemajn eĉ misiistojn, diakonojn, sacerdotojn kaj episkopojn, por interdividi ĝojon el evangelio. Interdividu la evangelion la familioj kiel ĝojon destinitan al la mondo!

Ĉiu el ni prepariĝu ekiri sian vojon kaj renovigi fidelecon al la Sinjoro kaj al la alvokiĝo, kiun ĉiu el ni ricevis. Alproprigu ni la preĝon de la sankta Patriko kaj kun ĝojo ni rediradu (la papo ĝin recitas en la gaela lingvo): „Kristo en mi, Kristo malantaŭ mi, Kristo apud mi, Kristo sub mi, Kristo super mi“. Kun ĝojo kaj forto, kiujn donadas la Sankta Spirito, ni diru al Li konfideme: »Sinjoro, al kiu ni iru? Vi havas la vortojn de la eterna vivo« (Joh 6,68).

**Danko de la papo fine de la sankta meso:**

Konklude de ĉi tiu eŭkaristia diservo kaj tiu ĉi belega Monda Renkontiĝo de la Familioj, de la Dia donaco al ni kaj al la tuta eklezio, mi elkore dankas al ĉiuj tiuj, kiuj diversmaniere partoprenis en ĝia realigo. Mi dankas al la ĉefepiskopo Marteno kaj al ĉefdiocezo de Dublino pro preparlaboroj kaj la organizado.

La speciala danko apartenas al registara subteno kaj asistado, al civitanaj reprezentantoj kaj al multaj volontuloj el Irlando kaj pluaj landoj, kiu grandanime dediĉis sian tempon kaj penadon. Aparte mi kore dankas al ĉiuj, kiuj por la sukceso de tiu ĉi renkontiĝo preĝis: al maljunuloj, geordenanoj, malsanuloj, malliberuloj... Mi estas konvinkita, ke tiu ĉi sukcesa renkontiĝo okazis danke al iliaj simplaj kaj persistaj preĝoj. Mi dankas al ĉiuj! La Sinjoro tion rekompencu al vi! ■

*Laŭ ĉeĥlingva traduko de Milan Glaser, 26.8.2018*



La papo Francisko dum sia vizito de Irlando veturadis per aŭtomobilo Ŝkoda-Rapid el Ĉeĥio.

La aŭtomobilfabriko en la urbo Mladá Boleslav, Ĉeĥio, estis oficiala partnero de la Monda Renkontiĝo de la Familioj en Irlando, kiun la papo dum du tagoj partoprenis. Por li kaj liaj akompanantoj estis disponigitaj kvar speciale ĝustigitaj aŭtomobiloj Ŝkoda-Rapid Spaceback. Pluajn aŭtomobilojn Ŝkoda-Octavia, Karoq kaj Superb, disponigis la produktisto por la ĉeestantaj kardinaloj kaj episkopoj. ■

## JESU´, DUM VIVO

Teksto kaj melodio Francisko Bühler, 1824




2. Ho, nin favoru, / ho, nin kompatu, / gvidu nin Jesu´, / al via bena glor´.

3. De via trono, / por nia bono / klinu Vin, Jesu´, / al mia preta kor´!

# LA 22-A EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO
## la 70-a de IKUE kaj la 68-a de KELI
## okazis de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2018
## en la urbo PODĚBRADY, Ĉeĥio

La Agrikultura Lernejo kun sia studenta hejmo en Poděbrady iĝis la kongresejo por la unusemajna 22-a Ekumena E-Kongreso. La kongreson partoprenis 75 personoj el 13 eŭropaj landoj kaj Japanio (Aŭstrio 2, Ĉeĥio 17, Estonio 2, Francio 3, Germanio 9, Hungario 4, Italio 5, Japanio 4, Kroatio 2, Rumanio 5, Slovakio 3, Svedio 4, Pollando 14, Ukrainio 1). La ĉeforganizanto de la kongreso estis frato Pavel Polnický - la sekretario de KELI.




**Lundo** la 6-a de aŭgusto estis alvetura kaj loĝiga tago de la kongresanoj.

**Mardon** post la komuna matena preĝo kaj kantado okazis solena malfermo de la kongreso. La kongresanojn salutis la urbestro de Poděbrady, direktorino de la Agrikultura Lernejo, evangeliana pastoro kaj prezidantoj de KELI Philippe Cousson kaj de IKUE Giovanni Daminelli.



*Prelegas prezidanto de KELI Philippe Cousson*

Post la solena malfermo de la kongreso okazis prelego de frato Philippe Cousson: Ni ĉiuj ricevis la saman akvon *(Apo 21,6)*.



*Prelegas vicprezid. de IKUE Marija Belošević*



*Solenan malfgermon de la kongreso gvidas Pavel Polnický*

Post li prelegis fratino Marija Belošević pri 50 jaroj de ekumenismo.

Posttagmeze okazis trarigardo de la urbo en du grupoj. La IKUE-grupo celis trarigardon de la urbo ĝis la katolika preĝejo de Altigo de la Sankta Kruco, en kiu okazis la esperantlingva sankta



*Mescelebras sac. Serhij Prudko el Ukrainio*

meso. La mescelebranto estis sac. Serhij Prudko el Ukrainio. Post la sankta meso sekvis plua parto de la trarigardo de la urbo.

Kaj vespere okazis interkona vespero finita per preĝo.

**Merkredon** post la matena preĝo kaj matenmanĝo okazis tuttaga busekskurso denove en du grupoj. Tiuj, kiuj volis partopreni la sanktan meson, tiuj unue vizitis la urbon Kutná Hora kun la fama preĝejo de sankta Barbara, poste preĝejon de sankta Jakobo, sekvis vizito de la preĝejo de Ĉielenpreno de la Virgulino Maria kaj de la sankta Johano Baptisto en Sedlec kaj de Ostejo en Sedlec.

Post tagmanĝo okazis vizito de la urbo Kolín, kie en la preĝejo de la sankta Bartolomeo okazis la esperantlingva sankta meso. Mescelebranto de ĉiuj esperantlingvaj sanktaj mesoj dum la kongreso estis pastro Serhij Prudko.

Vespere prezentis novajn religiajn E-librojn fratino Marija Belošević kaj la diversajn ceterajn librojn frato Petr Chrdle. La belega ekskursa tago estis finita per la vespera preĝo.

**Ĵaŭdon** matene la katolikaj kongresanoj okazigis en la loka preĝejo en Poděbrady la sanktan meson. Post la reveno kaj matenmanĝo okazis komuna kantado kaj jarkunvenoj de IKUE kaj KELI. Post tagmanĝo



*La preĝejo de sankta Barbara en Kutná Hora*



*Katolikaj kongresanoj post Kutná Hora vizitis preĝejon de Ĉielenpreno de V. Maria en Sedlec*



*Italaj kongresanoj kun IKUE-prezidanto Giovanní Daminelli (maldekstre)*

prelegis Marija Belošević pri ekumenismo en la katekismo de la katolika eklezio. Post ŝi prelegis frato Oldřich Fischer pri Biblio de Kralice, poste prelegis Petr Chrdle pri J. A. Komenio kaj L. L. Zamenhof – la simileco de iliaj vivomisioj, kaj tute fine prelegis frato Endel Ojasild pri Estonio – lando, historio kaj naturo.

Vespere prezentis tre interesan rakonton pastoro Wolfram Rohloff pri sia restado en Novgvineo. Per la vespera preĝo finiĝis la ĵaŭda tago.



*Pastro Serhij mescelebras en Lysá nad labem*

**Vendredon** post la matena preĝo, matenmanĝo kaj kantado prelegis frato Krešimir Belošević pri Praktikado de ekumenismo en Zagrebo kaj post li prelegis frato Philippe Cousson pri Unuiĝintaj Eklezioj.

Posttagmeze denove okazis ekskurso en du grupoj. Tiuj, kiuj deziris dumekskurse partopreni la katolikan E-meson, tiuj unue vizitis la urbon Přerov nad Labem – Polabské národopisné muzeum – Elboregionan etnografian muzeon kaj post ĝi la urbon Lysá nad Labem, kie en la preĝejo de la Naskiĝo de Johano la Baptisto okazis la esperantlingva sankta meso.

Vespere okazis interesa programo: La kongresanoj prezentas sin. Nu kaj per vespera preĝo estis fermita la belega vendreda kongresa tago.



*Polaj fratoj Jeremiasz Ratajczyk kaj Jerzy Kilijański kun kvar japanaj kongresaninoj*

**Sabaton** matene okazis la sankta meso en la preposta preĝejo de Poděbrady. Poste post la matenmanĝo kaj kantado prelegis frato Petr Chrdle pri Francisko Vladimiro Lorenc – lia vivo kaj verko. Post li prelegis fratino Marija Belošević pri Papo Francisko kaj ekumenismo.

Posttagmeze prelegis fratino Ágnes Ráczkevy-Eotvös pri apostoloj kaj iliaj atributoj. Post tio la kongresanoj vizitis preĝejon de



*Krešimir Belošević regalas per kroatia brando*



*La kantistino Jolana Smyčková-Haan*

Ĉeĥ-frata evangeliana eklezio, kie okazis belega koncerto de la religiaj kantoj, kiujn kantis Richard Haan – la solisto de la Ŝtata Operejo en Prago, kiun per orgenludo akompanis eminenta orgenludisto Martin Strejc. Belega estis kantprezentiĝo de s-ino Jolana Smyčková-Haan – la filino de la konata ĉeĥa esperantisto kaj longjara IKUE-ano Miroslav Smyčka.

Kaj vespere oni ankoraŭ pritraktis biblian studojn pri la teksto de la preĝsemajno.

**Dimanĉon** post kantado la katolikaj kongresanoj ĉeestis la sanktan meson en la paroĥa preĝejo de Poděbrady kune kun la paroĥanoj. La unua legaĵo estis legata ankaŭ esperantlingve kaj la predikon de la preposto lerte tradukis esperantlingven frato Pavol Petrík. La sanktan meson kun la loka preposto Mons. Vladimír Hronek kuncelebris la kongresano sac. Serhij Prudko el Ukrainio.

Ekumena diservo posttagmeze okazis en la evangeliana preĝejo de Poděbrady kaj poste samloke ankaŭ la koncerto de Koruso de s-ta Cecilio. Nu kaj vespere okazis programo de la tradicia adiaŭa vespero.

**Lundon** la 13-an de aŭgusto post matenmanĝo okazis matena preĝo kaj oficiala fermo de la kongreso

**Ĝis iam ie...**

La kongresaj tagoj pasis senprobleme, senkonflikte en frateca medio. Koregan dankegon meritas precipe frato Pavel Polnický kaj ceteraj kongresanoj, kiuj iel ajn helpis en organizado de la kongreso kaj en realigo de la kongresa programo. Koran dankon! ■

*Miloslav Šváček*

## PRIŜTELITA USONA TURISTO SKRIBIS AL ŜTELISTO: MI PARDONAS AL VI!



Usona turisto suferanta pro tumora malsano, kiu kun sia edzino realigis verŝajne sian lastan eksterlandan viziton, elektis neatenditan armilon „por venĝo" kontraŭ ŝtelisto, kiu ŝtelis sur ŝipeto en Venecio lian monujon kun kreditkarto.

Li skribis por li malfermitan leteron, kiun li sendis al loka gazetaro kaj kiun ankaŭ la taggazeto de la italaj episkopoj Avvenire (19.7.) publikigis. Li en ĝi skribas pri la terminala stadio de sia malsano kaj publike li al la ŝtelisto pardonas: „Mi estas kun la edzino sur la lasta vojo, mi mortas pro kancero kaj malgraŭ tio, ke vi min lasis sen mono kaj kreditkarto, mi pardonas al vi", tekstas en la letero de la sesdek-jaraĝa turisto. „Nur por momento vi imagu, kion ĉion vi al via viktimo kaŭzis", li daŭrigas en sia letero por ĝin finigi: „Mi preĝis, por ke mi kapablu pardoni al vi kaj mi preĝas por vi, por ke vi malproksimigu vin de la peko, kiu vundas senkulpajn homojn. Mi pardonas al vi!", sciigas la usona vizitinto de la urbo sur laguno al la nekonata ŝtelisto. ■

*(jag) 20.7.2018*

# FESTO DE LA SANKTAJ ĈEFANĜELOJ MIĤAEL, GABRIEL KAJ RAFAEL (29. 9.)



Kun **MIĤAEL**, kies nomo en hebrea lingvo estas rekta konfeso de kredo („Kiu kiel Dio?“), ni renkontiĝas antaŭĉio en la Libro de la Profeto Danielo. En tiu libro ni legas, ke fine „ekstaros Miĥael, granda protektanto, kaj li staros ĉe filoj de via popolo“. Tiu ĉi glora titolo, kiu lin igas „ĉefanĝelo“, koheras kun imago pri la ĉiela tribunalo, kiu ĉirkaŭas Dion. Kunsidas en ĝi – same kiel ĉe surtera tribunalo – anĝeloj de diversaj gradoj kaj diversaj dignecoj. Tiun ĉi hebrean tradicion akceptis ankaŭ kristanismo, ĉar ĝi parolas pri la „anĝelaj ĥoroj“ (Tronoj, Sinjoraro, Princaro, Potencularo, Virtularo...).

Miĥael, kiel la Libro de la profeto Daniel kelkfoje memorigas, estas „unu el unuaj anĝelaj princoj“. Laŭ li havas sian anĝelan „princon“ ankaŭ aliaj nacioj. Kiam la profeto parolas pri ĉi tiuj supernaturaj estuloj, li volas per tio emfazi, ke la historio ne estas nur en la manoj de la surteraj regantoj kaj ĝi ne direktiĝas nur per iliaj celadoj, sed ke la historion ankoraŭ regas alia forto kaj alia celado, kiun volas Dio vivigadi ĝuste pere de siaj kurieroj – la anĝeloj. Kiel protektanto de la Dia popolo batalas Miĥael ankaŭ kontraŭ ĉefa malamiko de la kredantoj – satano, kaj ĝuste en tiu versio ni renkontiĝas kun li en la 12-a ĉapitro de la Apokalipso de sankta apostolo Johano. Ĉi tie li obstine batalas kontraŭ ruĝa drako (havanta koloron de sango elverŝita dum homhistorio), kio simboligas subpremadan potencon. Miĥael en tiu batalo defendas virinon kaj ŝian ĵus naskitan filon, kiuj prezentas Dian popolon kaj la eklezion, en kiu estas Kristo konstante ĉeestanta (pli posta tradicio en la virino vidos Maria-n, patrinon de Jesuo). En la libro Apokalipso estas skribite: „Kaj fariĝis milito en la ĉielo: Miĥael kaj liaj anĝeloj ekmilitis kontraŭ la drako; kaj militis la drako kaj ĝiaj anĝeloj; kaj ne prosperis al ili, kaj ne plu troviĝis ilia loko en la ĉielo. Kaj ĵetiĝis malsupren la granda drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano, la trompanto de la tuta mondo; ĝi ĵetiĝis sur la teron, kaj ĝiaj anĝeloj ĵetiĝis kun ĝi“ (Apo 12,7-9) Miĥael estas do ĉi tie priskribita kiel batalanto de bono, kiu venas defendi justulojn kaj ekbatalas kontraŭ subpremantaj fortoj de malbono, kiuj ennestiĝis en mondaj regnoj kaj kiuj ekslodigas militojn. Miĥael aperas en iu ne tro konata, sed tre interesa novtesta-

## PREĜO AL LA ĈEFANĜELO MIĤAELO

Sankta Ĉefanĝelo Miĥaelo, defendu nin en batalo. Ŝirmu nin kontraŭ malico kaj insidoj de diablo. Dio ordonu al li, humile ni petas; kaj vi, princo de la ĉiela armeo, ĵetu satanon kaj la ceterajn malbonajn spiritojn, kiuj trairadas la mondon por pereigi animojn, per Dia potenco en la inferabismon. Amen.

menta libro – en Letero de la sankta apostolo Judo. Tie ĉi Miĥael ekbatalas kontraŭ diablo por elŝiri el lia povo korpon de ĵus mortinta Moseo. Tio estas resono de la malnovtempa hebrea tradicio.

Kun la ĉefanĝelo **GABRIEL** (hebrealingve „viro de Dio“, kaj do „forta viro“) ni renkontiĝas unue en Libro de la profeto Danielo kaj tuj estas evidente, kia estas lia ĉefa misio – li estas anĝelo, kiu eksplikas eksterordinarajn kaj nefacile kompreneblajn viziojn. En Nova Testamento li sin vidigas kiel anoncanto de alveno de Mesio. Unue li ĉe ofero en jerusalema templo videbliĝas al patro de Johano Baptisto Zeĥarja kaj poste al Maria en ŝia domo en Nazareto. La vortoj, per kiuj la anĝelo ŝin alparolas, ne koncernas nur promeson, ke al ŝi naskiĝos filo, kiel tio okazis ĉe Zeĥarja, sed li jam duoninformis, kiel fundamentŝanĝa persono estos Jesuo: „Li estos granda, kaj estos nomata Filo de la Plejaltulo; kaj Dio, la Eternulo, donos al li la tronon de lia patro David; kaj li reĝos super la domo de Jakob eterne, kaj lia regno ne havos finon.“ Gabriel do estas heroldanto de mesiaj tempoj kaj heroldanto de la centra evento de la savhistorio.






La tria ĉefanĝelo estas **RAFAEL**. Lia nomo hebrealingve estas „Dio resanigas“ kaj ĝuste ĝi respondas al misio de la anĝelo en tiu ĉi interesega rakonto. Rafael diras: „Mi estas Rafael, unu el sep anĝeloj, kiuj estas preparitaj por eniri antaŭ gloron de la Eternulo.“ Estas evidente, ke la misioj, kun kiuj venas Miĥael kaj Gabriel, havas oficialan aspekton rilate la historion de ĉiuj nacioj, dum Rafael rolas kiel anĝelo akompananta homon dum ĉiutaga vivo, kiu surprenas sur sin homan aspekton por esti al ni laŭeble plej proksime kaj por povi nin gvidi dum la vivo kiel vera „gardanĝelo“. Li estas amiko, kiu konsilas kaj kuraĝigas, li estas la videbla ĉeesto de la nevidebla Dio, neimageble amanta siajn kreitulojn. En Biblio Rafael aperas nur en la Libro de Tobija, sed la menciojn pri li ni trovas ankaŭ en diversaj apokrifoj. Pro sia povo resanigi li estas kultata kiel miraklofaranto kaj kiel patrono de ĉiuj, kiuj zorgas pri malsanuloj. ■

*Jaroslav Branžovský*

# GEEDZECO DE DIVORCULOJ

**Dum la erao de la profeto Malaĥio sur la judan popolon falis multaj katastrofoj. Judoj lamentis, petis Dion pri la kompato, sed vane, kaj la profeto diris, kial Dio ne elaŭdas iliajn petojn. Dio mem parolis per lia buŝo: *„Vi kovras la altaron de la Eternulo per larmoj, plorado kaj ĝemado tiel, ke Li jam ne povas rigardi la donojn nek akcepti ion agrable el via mano. Vi diras: Kial? Tial, ke la Eternulo estas atestanto inter vi kaj la edzino de via juneco, kontraŭ kiu vi agis perfide, kvankam ŝi estas via kamaradino kaj via leĝa edzino.”*** (Mal 2,13-14).

Dio punis la elektitan popolon, ĉar estis troveblaj tiuj, kiuj forlasis legitimajn edzinojn kaj prenis al si paganinojn. Ĉu hodiaŭ Dio ne volas puni la homaron, kiam ne nur la unuopuloj, sed centoj, miloj kaj centoj da miloj forlasas legitimajn edzinojn kaj edzojn – celante denove geedziĝi?

**La eklezio ne aprobas divorcojn**

Je la fono de la nuntempa malmorala vivo ekestis neimagebla kaoso en ĉi sfero! Anoncis sin ĉe la paroĥestro la paro intencanta geedziĝi. La paroĥestro post elaŭskulto de ilia peto malgaje respondas:

*„Bedaŭrinde, mi ne povas geedzigi vin, ĉar via edzo ankoraŭ vivas.*

*Nu jes, sed ni ricevis la civilan divorcon!*

*Nenion mi en tio povas fari! La geedzeco malgraŭ tio estas valida! Mi ne povas geedzigi vin.*

*Kial? Ĉu la Eklezio ne geedzigos nin?”* – indigniĝas ili ambaŭ.

*“Estimata pastro, mi estas alta ŝtata oficisto, ni devas ricevi la geedziĝon. Ni ja estas homoj religiemaj, sen la eklezia geedziĝo ni ne volas vivi. Se ni ne povas havi la geedzigan ceremonion en la katolika eklezio, tiam ni iros ien alien!...”*

La skandalo finiĝas per tio, ke ili iras al eklezio de alia konfesio, pensante, ke tie por la afero ili trovos solvon kaj trankvilon. Ĉu ne estas tio terura iluzio? Ili malaprobis la kredon, malgraŭ tio, ke eksteren ili sin prezentis kiel homoj religiemaj, ĉar al tio devigas ilin la sociaj kondiĉoj! Ili faris la paŝon, kaŭze de kiu la Eklezio ekskludis ilin el sia kredanta rondo, ili ne plu povas aliri al la sakramento de la pekkonfeso, akcepti la sanktan komunion, sed ili daŭre havas la senton, ke ili estas religiemaj – ĉar post tio ĉio ili ja „havis la nupton” en iu preĝejo!

**Sankta kaj nedisigebla**



Alia kazo. Juna paro anoncas sin por nupto. La fianĉino diras:

*„Estimata sinjoro paroĥestro, mi estas katolikino, sed kvankam mia fianĉo verdire ne estas katoliko, li estas preta doni konsentdeklaron, tial do mi opinias, ke ekzistas neniu kaŭzo, kiu malhelpus realigi la nupton. Sed... mi ne estas certa, eble ne estas en tio io malbona..., ke..., estimata pastro..., la fianĉo estis jam unufoje edziĝita, sed lia edzino estis alikonfesia kaj ŝi ricevis divorcon...., ĉu estas vero, ke tio ne malhelpos realigi nian geedziĝon?”* – finas timeme la junulino.

Kaj tuj ŝi ekaŭdis, ke jes, ke estas tio la obstaklo, pro kiu ne eblas ricevi geedziĝan sakramenton.

*“Ĉu ne povas? Kial?” – ŝi ekdemandis kolermiene.*

*“Pro tio, ke la Katolika Eklezio la geedziĝojn de aliaj konfesioj ankaŭ konsideras kiel sanktecajn. Eĉ kiel pli sanktecajn ol ilin rigardas tiuj aliaj konfesioj! Kaj ĉi tiujn geedziĝojn ĝi do konsideras kiel validajn...”*

Diru, ĉu tio ne estas impona logiko? Se gea paro de la nekatolikoj, sed kristanoj, ligiĝas per la geedziĝo, ni konsideras ĝin kiel validan. Ĝian validecon ni respektas pli ol tiuj konfesioj, en kiuj ili ekestis! Eĉ se tiuj ĉi konfesioj nuligas la geedziĝojn, ni tamen konsideras ilin kiel nedisigeblajn.

Plie: se judo kaj kristanino, sed ne katolikino, ligas sin per la geedziĝo, tiu geedziĝo ankaŭ estas valida! Eĉ se ilia kredo permesis al ili la divorcon, tiam ili povas nek edziĝi, nek edziniĝi kun katolik(in)o, ĉar la geedziĝo estis valida laŭ niaj principoj!

Jen, kiel la katolika eklezio alte aprezas la geedzigan ligon, asertante ĝin kiel la netuŝeblan!

### La **leĝo de la Eklezio**

*„Mi ne komprenas”* – iu diros – *„ĉiam mi aŭdas: Ekligu la geedzecon en la katolika eklezio, ĉar nur tia geedziĝo estas valida, kiu estis realigita en la katolika eklezio! Kaj jen oni ne volas doni la edziniĝon al la junulino, eĉ kiam ŝia unua fianĉo la unuan geedziĝon ekligis ne en la katolika eklezio!”.*

Kompreneble. La katolika eklezio povas doni ordonojn nur al siaj fideluloj. Por ili validas la leĝo: ke ilia geedzeco ne estas valida, se ĝi estis ekligita ekster la eklezio, sed ĝi agnoskas kiel validajn ankaŭ la geedziĝojn de la aliaj konfesioj. Do, se ankaŭ la nekatolikaj flankoj ekligas la geedziĝojn laŭ siaj konfesioj, la katolika eklezio rekonas ilin kiel validajn. Por ni, la sankteca, valida kaj nedisigebla, estas la geedziĝo, kiu estis realigita inter la geedza paro juda, budhisma aŭ japana. Kaj se el ili kiu ajn flanko ankoraŭ dum la vivo de la dua flanko volus ekligi geedzecon kun la flanko katolika, la Katolika Eklezio tion ne permesas, ĉar la unuan geedzecon ĝi rekonas kiel validan. Eĉ tiam, se unu el la flankoj tiun sian geedzecon nuligus.

Eble multaj homoj estas surprizitaj per tio, ke la katolika eklezio ne nur respektas la geedzecon de la aliaj konfesioj, sed eĉ pli ilin ĝi respektas, ol mem faras tiuj ĉi konfesioj, rigardante ilin kiel nedisigeblajn eĉ tiam, kiam tiuj konfesioj ebligas eksedzigon. La respekto kaj la estimo, per kiuj la katolika eklezio traktas la geedzecon ankaŭ de la aliaj konfesioj, estas nur la natureca manifestado de la profunda kaj serioza ĝia teniĝo al la geedzeco.

*La fragmento de la prediko de Episkopo Mons. Tihamer TOTH el lia libro: Małżeństwo chrześcijańskie (Kristana geedzeco).* ■

*El la pola esperantigis Stanisław Smigielski*

## VOJKRUCIĜOJ DE LA VIVO

### Trovo de la ĝusta loko en la vivo

Trafika priservanto, kiu komandas la ŝosean trafikon sur la vojkruciĝo, devas stari surloke, el kiu li povas sekure observi la trafikon sur ĉiuj alireblaj trafikvojoj direktantaj al la vojkruciĝo. (Loze el dokumento pri la reguloj de la ŝosea trafiko.)

Ni imagu al ni trafikpolicanon, kiu volas komandi la trafikon sur la vojkruciĝo kaj anstataŭ tio, por ke li starigu sin en ĝian mezon, li sin starigis ekster ĝi, en la mezon de unu el la flankaj stratoj. Alivorte: li staras malantaŭ la angulo. Verdire li havas supervidon, sed nur kaj sole pri la trafiko de la veturiloj sur tiu ĉi strato, kie li ĵus staras. Kio okazas pri la veturiloj en transversa direkto, tion li povas nur supozi. Se li starigus sin tiel, ke li estu plene informita pri la trafiko malantaŭ la dua angulo, li denove perdas supervidon, kio okazas sur la antaŭa loko.

Similajn erarojn, kiel tiu policisto, allasas

sur la vivkruciĝoj ankaŭ ni mem. En la vivo ne eblas vidi ĉion bone, se ni tion rigardas nur el unu flanko, ĉar la unuflankaj rigardoj estas konfuzigaj.

La homa vivo estas malsimpla, ofte pli malsimpla ol la plej trafikplena vojkruciĝo. Por eviti kunpuŝiĝojn, kiuj povas partoprenantojn de la trafiko vundigi aŭ eĉ mortigi, estas necese okupi tian teniĝon, el kiu ni vidas laŭeble plej bone en ĉiujn elirajn direktojn. Neniukaze ni devus permesi al ni en tiaj situacioj ludi je birdoj kaj solvi la komplikecojn de la vivkruciĝoj per superiĝo super la problemojn aŭ per transflugo el respondeco al propra sekureco.

La komplikeco de la vivkruciĝoj povas delogi ankaŭ al tio, ke ni la rigardon al la apartaj situacioj pli faciligu. Sed tia plifaciligo estas nenio alia ol deformigo de la aferoj, do okupo de la stariĝo „malantaŭ la angulo“. Kaj de tie oni komplikecon de la vivkruciĝoj ne solvos.

Al la ĝojo de la homa animo aldonas sian parton ne nur trovo de la ĝusta starpunkto de la vivvojoj, sed ankaŭ trovo de la ĝusta loko en la tuta vivo. Iu el la spiritaj gvidantoj rekomendas, ke ni staru en la pozicio, kie estas nia orelo almetita al la koro de nia ĉiela Patro kaj la mano sur la pulso de nia planedo. ■



*Sac. D-ro Max Kašparů*

*(El lia libro „Pri la ĝojoj de la homa animo“.)*

## SUB VIAN PROTEKTON

Ĉiela Patrino,
Stelo Matena,
Ĉielarko de Espero.
Kunkudru la ĉielon
kun la tero
per la fadeno
de Diaj gracoj.
Vestu vekiĝintan tagon
en Di-benitan mantelon.
Sub Vian Protekton
ni rifuĝas…
Perantino nia.

## ESTU PERANTINO

Patrino de Vivo,
Patrino de Vero,
Patrino de Vojo
kaj nia espero...
Sub Vian protekton
rifuĝas infanoj.
Estu perantino
por IKUE-anoj.



***Graca bildo de Di-patrino de Ĉenstoĥova, Pollando***

## PRINTEMPO

Vekiĝis printempo.
Ridas al ni floroj.
La mirakla tempo
Ĝojigas la korojn.

Dancas sunradioj
Sur akvosupraĵo.
Donas gracojn Dio
por siaj estaĵoj.

Kantas bird' sub ĉielo
kun granda kortuŝo.
Zumas jam abeloj
kaj malgrandaj muŝoj.

Ho fabela mondo!
Muzik' en aero.
Ni faru la rondon
kaj zonu la teron.

*Bogusław Sobol*
*Pollando*

# LA PREDIKO PRI LA SANKTA MES-OFERO

Ĉiuj bonfaroj entute per sia valoro ne egaliĝas al la sankta mes-ofero, ĉar ili estas homaj faroj, sed la sankta meso estas verko de Dio. Martireco estas nenio komparebla al ĝi. Ĝi estas la ofero, kiun homo per sia vivo redonas al Dio. La sankta meso estas la ofero, kiun Dio alportas al homo per siaj Korpo kaj Sango. Ho, kiel grava persono estas sacerdoto! Se li tiun ĉi sian mision ekkomprenus, li mortus. Dio lin obeas. Li diras du frazojn kaj nia Sinjoro je lia signo el la ĉielo eniras en malgrandan hostion. Dio fiksas la rigardon al altaro. „Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata" li diras, „en kiu Mi havas plezuron." Dio nenion povas al ni rifuzi pro meritoj, kiuj rezultas el oferado de tiu ĉi Ŝafido. Se ni havus kredon, ni vidus Dion en la sacerdoto, kiu estas kaŝita kiel lumo malantaŭ vitro, kiel vino miksita kun akvo. Kiam mi tenas post transsubstanciiĝo la Plejsanktan Korpon de nia Sinjoro per miaj manoj, ofte mi konsciiĝas, ke mi cetere meritas nur inferon. Mi diras nur por mi mem: „Ho, se mi nur povus Lin kunpreni. La infero estus en lia ĉeesto agrabla. Ne estus por mi malfacile tie dum la tuta eterneco suferi, se ni tie estus kune. Sed tiam la infero eĉ ne ekzistus, la amflamoj estingus la flamojn de la justeco."

Kiel tio estas bela! Post transsubstanciiĝo estas ĉi tie bona Dio kiel en la ĉielo. Se homo bone ekkomprenus tiun ĉi misteron, li mortus per la amo. Dio nin indulgas pro nia malforteco.

Iu sacerdoto post transsubstanciiĝo iom dubis, ĉu kelkaj liaj vortoj povas kaŭzi, ke nia Sinjoro descendis sur la altaron. Tiumomente li ekvidis la hostion tute ruĝan – koloriĝintan per sango.

Imagu, ke iu dirus al ni: „Tiu revivigas mortinton." Kiel rapide ni kurus por vidi tion. Sed ĉu la transsubstanciiĝo, en kiu ŝanĝiĝas pano kaj vino je Korpo kaj Sango de Dio, ne estas ege pli granda miraklo ol revivigo de la mortinto? Ni devus almenaŭ kvaronhoron prepariĝadi por la sankta meso. Ni devus ĉiam antaŭ bona Dio kiom eble plej multe humiliĝi, kiel li tiel plej multe malaltiĝadas al ni en la Plejsankta Sakramento. Ni devus kiom eble plej severe konscienc-ekzameni, ĉar ni devas esti en stato de graco por ĝuste travivi la sanktan meson.



Se ni ekkonus valoron de la sankta meso, aŭ pli bone se ni havus kredon, tiam ni ĝin ĉeestadus multe pli fervore. Ĉu vi rememoras, karaj infanoj, la eventon, kiun mi rakontis al vi pri la sacerdoto, kiu preĝis por sia amiko? Dio donis al li ekkonon, ke li estas en purgatorio. Li pensis, ke por li li povas fari nenion pli efikan ol oferi por lia animo la sanktan meson. En la momento de transsubstanciiĝo li prenis per siaj fingroj la hostion kaj diris: „Sankta Patro, ni faru interŝanĝon. Vi havas animon de mia amiko, kiu estas en la purgatorio, kaj mi havas Korpon de via Filo, kiu estas en miaj manoj. Do liberigu mian amikon kaj mi donos al vi vian Filon kun ĉiuj liaj meritoj kaj sufero." Kaj fakte, en la momento de transsubstanciiĝo li vidis la animon de sia amiko tute brilantan ascendi en la gloron de la ĉielo. Se ni volas, karaj infanoj, atingi ion de la bona Dio, ni ankaŭ faru tion tiel. Ni oferu al Li lian amatan Filon kun ĉiuj meritoj de lia morto kaj sufero. Poste li nenion al ni rifuzos. ■

*Sankta Johano Maria Vianney*

# MI ESTAS LA VOJO KAJ LA VERO KAJ LA VIVO

*Moto: Sinjoro, donadu al mi forton por ŝanĝi tion, kion mi ŝanĝi povas, humilon por akcepti tion, kion ŝanĝi mi ne povas, kaj saĝon, por tion inter ili distingi...*

I. Sinjoro, eĉ se ofte mi ne kapablas je ĉio tuj trovi respondon, donu, ke mi kun anima kvieto kaj humila menso akceptu, ke ĉio havas sian tempon difinitan per via Providenco, ke mi akceptu kaj danku pro ĉio, kion donos al mi tiu ĉi tago, ke mi almenaŭ ĉiuhore kaj antaŭ ĉiu komencita laboro ne forgesu turni min kun peto kaj rememoro al Vi.



II. Ne permesu, ke mi estu superregata per peko kaj forgeso, ke ĉio, kion Vi sendas, estas helpo por bono al tiu, kiu fidas Vin, ke eĉ se Vi iam allasas provojn, neniam Vi forlasas, sed male Vi donas forton por superi ilin.

III. Kun konscio, ke en ĉio estas Via sankta volo, per la Sankta Spirito min instruu kaj subtenu, ke mi per la peko ne estu blindigita tiom multe, ke mi kapablu distingi malbonojn, kiujn mi faras.

IV. Dekutimigu min de senpacienco, incitiĝo, malamo, kolero, senpripensaj juĝoj, indiferenteco, egoismo, avideco, klopodo sukcesigi proprajn sopirojn. Ke mi ne opiniu ĉion kiel memevidentan aferon, kaj ke mi super mia kolero ne lasu subiri sunon.

V. Instruu min persiste praktikadi ĉiujn virtojn, por ke mi al ili neniam malfideliĝu, ne lasu mian animon per angoro suferi kaj restadi en la peko, malkvieto, malcerteco kaj nekredemo, sed ĉe ĉiu misago min, mi petas, levu.

VI. Pro ĉio mi al Vi dankas, pro la graco, per kiu Vi donacas al mi ĉiun tagon, en kiu Vi donas al mi eblon esti pli bona kaj pli utila – por mia prospero kaj Via glorigo.

VII. Gardu mian animon kontraŭ pereigaj inklinoj, danĝeroj kaj tentoj de la mondo; ke mi ĉion faru pro la amo kaj kun la amo kaj mi sentu pacon en la animo kaj ĝojon en la koro kune kun miaj proksimuloj.

VIII. Instruu min agadi afable rilate al ĉiu proksimulo, ke ni neniun malĝojigu kaj al neniu faru maljustaĵon, al neniu reciproku maljustaĵojn, sed male mi rilate al ĉiu estu lumo kaj modelo disdonanta ĝojon al ĉiuj, kiujn Vi sendos renkonte al mi.

IX. Ke mi estu kontenta pri tio, kion Vi per Via graco donadas al mi kaj pri tio, ke mi ĉiam estu tie, kie Vi volas min havi.

X. Sendu, mi petas, ĉiam ĝustatempe Viajn helpantojn kaj inspirojn, precipe en la momentoj de malforteco, aŭ de eblo, ke mi povus malbonfari. Donu al mi kapablon ĉiam ĝuste distingi Dian inspiron kaj Dian voĉon disde la voĉo de racio kaj pasioj.

XI. Ke mi kapablu kun ĝojo liberigi min de aferoj nebezonaj kaj superfluaj kaj ĉiam mi zorgu pri la eternaj valoroj. Donadu al mi forton, precipe kie mi estas plej malforta kaj donacu al mi Vian pacon.

XII. Sinjoro, donadu al mi kapablon sperti Dian protekton, Vian benon, mizerikordon kaj ŝirmon kontraŭ malbono videbla kaj nevidebla; lumigu kaj rektigu mian vivovojon; instruu min neniam perdi esperon, havi ĝustajn petojn kaj intencojn, ĉion kun danko akceptadi, helpadi al bezonuloj kaj konstante pardonadi, por ke mi tiun donacon – tiun naskon – ne vantigu! Tiel okazu! ■

*(Aŭtoro anonima)*